




—Kiun naciveston vi survestos por la Balo?
 —La Esperantan.
 —El kiu lando?

GRIS
 PARIS

NE ABONU LA GAZETON

Unu jaro. 3 Fr. (1,200 sm.)
 Jarduono. 2 » (0,800 sm.)

JEN

Plumdirektoro: Fred. Pujulà.  Krajondirektoro: Apa.

Eldonisto: RAMON FARRÉ. str. Portaferriça, 17, BARCELONO. (Li petas, oni faru la pagon per la «ĈEBANKO ESPERANTISTA» Merton Abbey. LONDON SW.)

REPREZENTANTOJ.

- G. Warnier, «Librairie de l'Esperanto» 15, rue Montmartre, Parizo.
- Möller & Borel, «Esperanto Ver ag» 18/19, Lindenstr. BERLINO SW.
- Andr. Fred. Host & Son, Kg. L. Hofboghandel. Bredgade, 35, KJOBENHAVN.
- «The British Esperanto Association» Museum Station Buildings, 133-6, High Holborn, LONDON. WC.

L. — De nun mi akceptas ĉiun kondiĉon, ĉar mi supozas, ke ili estos konvenaj.

P. — (Eltirante paperon el la poŝo). Aŭdu:

Regulo 1.^a La loĝanto kaj lia familio vekigōs kaj kuŝigōs je la sama horo, kiel la mastro de la domo, ĉar tiu ĉi loĝas en la suba apartamento, kaj ne volas esti ĝenata per la bruo.

Regulo 2.^a La loĝanto estas devigata eliri ĉiutage du fojojn sur la balkonon, frotante siajn manojn kun kontentega nieno, por enviigi la promenantojn, kaj pli-grandigi la gravecon de la domo.

Regulo 3.^a Se la loĝanto ne konas la damludon, li lernos, por ludi kun la posedanto de la domo la vesperojn de li elektitajn.

Regulo 4.^a La prezo de la luo estas: 22 duroj ĉiumonate, pagitaj poĵare, kaj ĉe la komenco de la jaro. Kiam la imposto de la bieno estos pligrandigita, la loĝantos devos pagi unu peseton plian por ĉiu plia kvin-solda monero de la imposto.

L. — Ĉu estas nenio plu?

P. — Restas ankoraŭ kelkaj reguloj malpli gravaj, kiujn mi montros al vi ĝustatempe.

L. — Ŝajnas al mi tre bone. Mi kredas, ke ni interkonsentos.

P. — Ĉu vi estas poeto?

L. — Jes sinjoro; ofte mi amuziĝas farante versojn, kaj multaj publikiĝis.

P. — (Kontenta). Ĉu — subtenanto de la Floraj Ludoj?

L. — Ne sinjoro.

P. — Mi bedaŭras! Vi devos klopodi fariĝi tia. Mia edzino deziregas okupi la lokon de Clemencia Isaura.

L. — Mi klopodos kiel eble.

P. — Tre bone; mirinde!

L. — Nu, estas interkonsetite, ĉu ne? 22 durojn ĉiumonate...?

P. — Pardonu; ankoraŭ mankas demando.

L. — Kiu?

P. — Vi forgesis diri al mi, kial vi forlasas la apartamenton, kiun vi nun okupas.

L. — Ho, pro bagatelo; mi havis malgrandan diskuteton kun la mastro de la domo, kaj mi ĵetis lin tra la fenestro.

C. M.

(El *Un tros de paper*. Komencon de la pasinta jarcento.)



—La socia demando?... Nu! Unuj kondukas la ĉaron; aliaj veturas en ĝi; ĉiu plendas, kaj neniu pensas pri la ĉevaloj.

—Sed, kiuj estas la ĉevalo, en la socio?

—Ni!

—Parolu en ununombro, mia kara!

—Vi, dol!



—Kiel vi juĝas la Katalunan ĉampanvinon ?
—Tute, kiel la germanan bieron de l' Paragvajo.



BORIS Forst. 02.

—Kial tiel malgajaj? Ĉu vi venas de enterigo?
—Jes; mortiĝis al ni, la edzino de ĉi tiu.



—Kia senfrukteco, patrino! Ŝi nur vidas radikojn!
—Kial vi plendas? Tio ĉi ja farus la feliĉon de gramatikisto!



LA VERDA STANDARDO

—Kiel! Ĉu vi havas nenion esperantistan en tiu ĉi kafejo?
 —Jes, sinjoro; ni havas mintlikvoron!



—Jen mistero, kiun mi ne povas klarigi al mi: kial estas tiom da amo en la *Mistero de Doloro*, kaj kial tiom da doloro en la *Misteroj de Amol*



LRIS

—Bleuriot? Wright? Monoplandoj? Biplanoj? Pse! Mi konfesas, ke mi nur havas fidon al la direkteblaj balonoj.



LR15

POST LA KONGRESO.


—Kiel ŝajnis al vi la V^a Kongreso?

—Bonega! Ĝi tiel multe plaĉis al mi, ke mi decidis ĉeesti la V^{an} Kongreson de la venonta jaro.



LA UNA EPOKO


—Mi venas peti, ĉu vi volas fianĉiniĝi je mi.
 —Mi petas pardonon. Mi estas tro juna. Bonvola atendi du monatojn ankoraŭ.



—Mi volas memmortigi min kaj venas pruntepeti vian revolveron.
 —Vi havos, sed vi redonos ĝin, ĉu ne?



—Ĉu vi deziras manĝi laŭ menuo, aŭ laŭ preparita tag-maĝo.
 —Ni preferas manĝi laŭ nia apetito.



—Bone, sed kiel utilos al vi scii la internacian lingvon!
 —Mi povos samtempe labori en ĉiu haveno de la mondo.



ERIS

MONDUMECO

- Oni multe parolas nun pri pragmatismo. Kio estas ĝi?
—Kiel mi povos klarigi?... ĝi estas nova filozofia ideo ĵus elpensita, kaj...
—Jes, mi komprenas: la filozofio sen fadenoj.



SENKURAGIGITA IDISTO

—Antaŭ du jaroj, la reformemuloj estis inteligentaj personoj. Nun, kia naŭzo!, eĉ la malsprituloj estas partianoj de reformoj!



ANKAŬ ESTONTISTOJ

- Kion vi opinias pri la *Futurismo* de Marinetti, tiu nova itala filozofia teorio ?
— Ne interesas min. Ĝi ne estas nova. Oni parolis al mi pri ĝi antaŭ kelkaj horoj.



KUNSIDO DE REDAKTOROJ DE «L'IMMONDE ESPERANTISTE»

- Ĉu vi estas certaj, ke la Esperanto, kiun ni uzas, estas klara?
- Jes, kial ne?
- Ĉar vane ni insultas ĉiujn. Neniu respondas nek pagas. Mi suspektas, ke oni ne komprenas nin.
- Mi timas, ke oni ne nin aŭskultas!



ANKORAŬ «CHANTECLAIR»

—Jam antaŭ longe, koko estis pritraktata en la esperantista teatro.
La jokeo (maleslime) —Jes, sed ĝi estis «koko sen spronoj»!



—Tre kurioza! Tiel malgranda, kaj li gajnas sian vivon!
—Pli malgrandaj vi estis, kiam vi komencis gajni vian!



GRIS

—Ĉu vere, vi fine aĉetos al mi aeroplanon?
—Jes, certe. Mi ĵus legis, ke tri aeroplanistoj disrompis sian kapon!



—Imagu, ke mi estas sintakso, kaj mia amikino—ortografio. Kiun vi elektus el ni ambaŭ?
—Mi tre ŝatas sintakson sen manko de ortografio.



—Kion vi deziras, sinjorino?
—Kunmanĝanton.



— Pro kio similas aeroplano al esperantisto?

— Pro tio, ke ĉiu aeroplano okupas sia lokon en la spaco, kaj baldaŭ, ankaŭ ĉiu esperantisto estos en sia L. K.